

# KATALUNA ESPERANTISTO

OFICIALA ORGANO DE LA KATALUNA ESPERANTISTA  
FEDERACIO KAJ DE LA INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ

---

## XVIII CONGRÉS UNIVERSAL D'ESPERANTO

Durant la primera setmana del mes present ha tingut lloc a Edimburg el XVIII-è Congrés Universal d'Esperanto, sota el patronat del Duc de Connaught, de l'Ajuntament d'Edimburg, del batlle de Glasgow, del de Sheffield, de la Cambra de Comerç d'Edimburg, de la Edimburg Education Authority, de diferents professors de les Universitats de Liverpool, Manchester, Oxford, Birmingham, Londres, etc.

La II Universitat Internacional d'Istiu ha tingut lloc al mateix temps que el Congrés, sota la presidència honorària del professor i esperantista Charles Richet de la Universitat de París. Les Facultats organitzades ho han estat amb l'assistència de professors de les Universitats de Ginebra, Cracòvia, Leipzig, Londres, Birmingham, Liverpool, París, etc.

Novament han demostrat els esperantistes que la qüestió d'un idioma internacional, per mitjà del qual els homes de diferent parla es poden entendre perfectament, és ja un fet. Més de 1000 esperantistes procedents de més de 35 nacions s'han reunit a la General Assembly Hall i a la United Free Church of Scotland i l'idioma únic ha estat el mitjà de comprensió.

Cal remarcar que l'esperit que es respira a tots els Congressos Universals d'Esperanto fa sentir la germanor que regna entre homes que lluiten per un ideal noble, entre homes que encara que se saben procedents de nacionalitats diferents, saben que per damunt de tot hi regna la germanor universal, sense imposicions de cap mena, sense dominadors ni dominats.

En representació de la Federació Catalana d'Esperantistes ha assistit a les sessions del Congrés el Dr. Marian Solà de Terrassa, el qual properament donarà una conferència pública en un dels nostres Ateneus de Barcelona, per tal de posar de relleu l'importància i transcendència del Congrés suara celebrat.

El lloc i hora s'anunciarà oportunament per mitjà de la premsa.

# “KATALUNA ESPERANTISTO”

## OFICIALA ORGANO DE KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO

Membra kotizaĵo: 3'50 p.; Grupoj: 1'20 por membro.  
Jarabono: 6 p. enlande kaj 6 sv. fr. internacie. Provezkemplero 2 respondkuponoj.  
Federacia sidejo kaj redakitejo: carrer València, 245 - BARCELONA

### FEDERACIAJ GRUPOJ

*Esperantista Klubo Palma*  
Mesquida, 6 ent. Palma de Mallorca

*Empordanana Ebenajo*  
(Girona) Armentera

*Esperanta Nesto*  
(Joventut Katòlica) Ripollet

*Fratego*  
Placo Pi i Margall, 14. Vendrell

*Gerona Espero*  
(Creu Roja) Girona

*Lumon*  
St. Antoni, 64. Terrassa

*Studenta Juneco*  
(Seminari) Girona

*Aplec (Soc.)*  
Mendizàbal, 3. Sabadell

*Bela Espero*  
Carretera de Vich, 41. Manresa

*Esperanta Idealo*  
Mossèn Verdguer Sta. Coloma Farnés

*Esperantista Amikeco*  
Plaça Bernardí, 10. Manlleu

*Esperanta Burgono*  
(Centre Democràtic) Rubí

*Internacia Fratego*  
(Coop. La Colmena) Sta. Coloma Gramanet

*Paco kaj Amo (Soc.)*  
Planeta, 16, pral. Barcelona

*Barcelona Stelo*  
Marquès Duero, 101. Barcelona

*Barcelona Esperanto-Societo*  
Bretón Herreros, 18, 1. Barcelona

*Armentera: Empordanana Ebenajo*

*Banyoles: Sro. Joan Aulina*

*Figueres: Sro. Carles Varela*

*Girona: Sro. Josep M-a Dalmau*

*La Garriga: Sro. Joan Blancafort*

*Mahó: Sro. S. Ortega Barceló*

*Manlleu: Sro. Marian Vilardell*

*Manresa: Sro. Josep Albagés*

*Mataró: Sro. Francesc Torres*

*Molins de Rei: Sro. A. Canals*

*Monistrol de Montserrat: Sro. F. Orobitg, Pastro*

*Palafrugell: Sro. Francesc Sagrera*

*Palau de Montgat: Fino. Lluïsa Bargés*

*Palma de Mallorca: Sro. Narcís Bofill*

*Reus: Sro. Enric Agnadé*

*Ripollet: Sro. Josep Planas, Pastro*

*Rubi: Sro. Joan Ratés*

*Sabadell: Sro. J. Comadran*

*St. Adrià del Besòs: Sro. S. Arnella*

*St. Martí Sapresa: Sro. Joan Rieradevall*

*Sta. Coloma de Farnés: Sro. Pere Costa*

*Sta. Coloma de Gramanet: Internacia Fratego*

*Sallent: Sro. Lluï Solé*

*Sóller: Sro. M. Arbona*

*St. Feliu de Pallarols: Sro. J. Collteldevall*

*Terrassa: Sro. Ramon Marsà*

*Teyà: Dro. Jacint Barrera*

*Vendrell: Fino. Maria Julivert*

*Vich: Sro. Pere Farrés*

*Vidreles: Sro. Josep Macià*

*Vilanova i Geltrú: Sro. Jaume Fort*

*Vilassar de Mar: Sro. Pere Domènech*

### LOKAJ DELEGITOJ

*Ager: Fino. Maria Plans*

*Almúnia de Castellví: Sro. Pere Esvertit*

*Amella de Merola: Sro. Miquel Arpa*

*Artés: Sro. Manuel Monrós*

Ni bezonas delegiton en ĉiu loko kie ni havas membron. Fervoruloj bonvolu sin turni al la sekretario de K. E. F.



# KATALUNA ESPERANTISTO

OFICIALA ORGANO

DE LA KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO KAJ  
DE LA INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ

Nia devizo: *Maro estas gutaro* Redakcio: Carrer València, 245 - BARCELONA

DIREKTORO: S. ALBERICH JOFRÉ

Redaktoroj: Delfi Dalmau, Jaume Grau, Marian Solà

## Neceseco de Komuna Agado

Antaŭ kelka tempo ni dissendis al diversaj samideanoj en la lokoj, kie ni ne havas delegiton, cirkuleron celantan la elekton de delegitoj, la stariĝon de grupoj, la organizon de propagando kaj kursoj, k. t. p. Al la federaciaj grupoj ni faris kelkajn demandojn, al aliaj ni proponis, ke ili venu al niaj vicoj, kaj kun bedaŭro ni konstatas, ke preskaŭ absoluta silento estas la rezultato.

Depost la komenco de la jaro diversfoje ni admonis niajn abonantojn, ke ili pagu kiel eble plej baldaŭ la abonkoston por eviti al nia gazeto financajn malhelpojn, sed malgraŭ niaj petoj triono de nia abonantaro ne kvitigis ankoraŭ sian ŝuldon.

Se nia financa situacio ne dependus de niaj membroj kaj abonantoj, se nia gazeto ĝuus sendanĝeran ekzistadon, ni ne devus altiri ankoraŭfoje vian atenton al tiu ĉi malagrabla temo, la plej grava por K. E. F. kaj por ĝia presorgano.

Komuna agado estas necesa en tiuj movadoj, kiuj okupas en la vivo malgrandan kampon, kiuj bezonas la kunhelpon kaj kunlaboron de ĉiuj siaj partianoj por iom pezi en la publika opinio. Superflue estas konsenti, ke nia afero, ke la fortoj subtenantaj la esperanto-movadon ne estas tiel gravaj, ke oni povas malatenti la sugestojn kaj klopodojn de la centro por libere disvolvigadi, ĉiu laŭ sia plaĉo kaj deziro.

K. E. F. esperas, ke ĝiaj membroj atente pristudos la neceson de komuna agado kaj la utilecon de baldaŭna plenumo de la devoj, por eltiri maksimuman rezultaton el la kunagado de la katalunaj esperantistoj.

Por la bono de nia afero, por la prospero de via Federacio kaj gazeto, laboru saĝe, propagandu konstante kaj varbu samideanojn por K. E. F.

## La interrompita poemo

Hier, entre ses bras, sur sa lèvre fidèle,  
j'ai surpris quelques vers que j'avais faits pour elle.  
Et sa bouche, au moment que je l'allais quitter,  
m'a dit: "Tes vers sont doux, j'aime à les répéter."

ANDRÉ CHENIER

Sur ŝiaj dolĉaj lipoj poemo mia sonis  
kaj flui ĝin mi aŭdis en plej konfuza mir'.  
En ĝi mian esprimon apenaŭ mi rekonis  
kaj ŝajnis ĝiaj sonoj el pli sonora lir'.

Kun rava melodio fluadis la esprimoj  
nur akre eligintaj el mia kruda pens'.  
En miaj versoj estis pli belaj novaj rimoj  
kaj ĉiu vorto havis mirige pli da senc'.

Min ravis de la strofoj la ondoj harmoniaj,  
de tuta la poemo la ritmo kaj sonor';  
surprize tiujn strofojn mi ja ne kredis miaj,  
sed sia l' ampasion ja sentis mia kor'.

Miraklo tio estis de ŝia voĉo bela,  
de ŝia gest' gracia, akcent' plena de varm'.  
De miaj pensoj vibris en ŝi l' eĥo fidela  
kaj tial en ŝi estis por mi tiela ĉarm'.

En ŝia voĉo estis la tono plej muzika,  
la milda energio kaj ritmo de deklam'...  
mi sentis ian ĝuon pri amo romantika,  
aŭdante ŝin esprimi pri mia propra am'.

Sed jen subite estis en ŝi petol' gracia:  
ŝi kvazaŭ al mi turnis l' esprimojn de l' poem';  
mi ĝojis plej feliĉe pri tia ŝerc' pasia:  
poemon ŝi ne finis pro ama ĉirkaŭprem'.

La lastan strofon mian laŭtvoĉe ŝi ne legis  
pro tiu de l' poemo subita ĝoja fin'.  
Sed tamen la fervoro de tiu strofo regis,  
ĉar ambaŭ ni tutkore per kisoj legis ĝin...

JAUME GRAU CASAS



## Ruĝa Lanterno

— Ŝajne, vi ankaŭ interesiĝas je fotografado? — mi demandis la mastron, ĵus li enkondukis min en sian kabineton, kie estis aranĝita por mi lito.

La mastro, dika, senhara bonanima bienhavanto, en kies domo mi trovis rifuĝejon de pluvego, kiu atakis min subite, dum mi revenis piedire el la urbo, kun miro fikse ekrigardis min kaj nee ekbalancis per la kapo.

— Plej malmulte... — li respondis. — Pli ĝuste, mi havas tute nenian ideon pri ĝi. Sed kial venis subite vian kapon tia stranga demando?

Mi senvorte montris al li per la mano grandan elegantan kupran lanternon kun ruĝaj vitroj, kiu, starante sur supra breto de libroŝranko, tuj altiris mian atenton, ĵus mi transpaŝis sojlon de la ĉambro.

— Ha, vi pri la lanterno! — diris la mastro surprizita kaj agrabla ride-to ekglitis tra lia vizaĝo. — Oni efektive iam uzis ĝin ĉe fotografado, sed mi ricevis ĝin donace antaŭ longe kaj de tiam mi konservas ĝin zorge, kiel memoraĵon. Eble, detala rakonto pri ĝi estos tro longa, eble, vi preferos aŭskulti ĝin alifoje?

Mi tuj rimarkis, ke per mia subita demando mi tuŝetis ian neordinaran temon, ke mi vekis en mia amiko ian malproksiman kaj karan rememoron kaj, malgraŭ laceco, kiun mi sentis pro longa piedirado, mi trankviligis lin, ke mi kun plezuro aŭskultos la rakonton, kiom ajn longa ĝi estus, ke mi ne ekdormos dum la tuta nokto, se li prokrastos ĝin.

Mia amiko agrable ekridetis kaj, neatendante miajn pluaĵn petojn, sidigis. Kvazaŭ rememorante detalojn, li poste sulkis la frunton, sed post nelonge, kun dolĉa memkontenta mieno, gaje frapetante per la fingroj je la tablo, komencis:

— Nu, tio ĉi okazis antaŭ longe, ankoraŭ dum mia malproksima feliĉa juneco. Mi tiam lernis en sesa aŭ sepa klaso de gimnazio, fininte kurson post kiu, mi revis, laŭ deziro de la patro, eniri medicinan fakultaton de universitato. Estis belega printempa sezono kaj en la junan kapon venis kiaj ajn ideoj kaj pensoj, krom tiuj, kiuj estis studotaj en enuigaj lernolibroj. Post unu-du tagoj devis okazi unu el plej malfacilaj ekzamenoj, tial mi devis streĉi ĉiujn miajn kapablojn. Sed, kiel intence, je tiu ĉi fojo mi ne prosperis en tio ĉi: miaj pensoj nerimarkeble kuris malproksimen, for de la urbo kaj nevole kunportis min kun si en la kamparon. Ĝuste dum unu tia minuto de maldiligenteco kaj malatenteco mi ricevis leteron de la patro. Mi devas diri al vi, ke la patro tre amis min, fierigis je miaj sukcesoj kaj ĉiamaniere penis kuraĝigi min. Interalie, dum ekzamenoj, aŭ antaŭ ili, li ĉiam promesis al mi ian allogaĵon, ricevotan post sukcese finotaj ekzamenoj. Nu, je tiu ĉi fojo lia allogaĵo estis plej ĝustatempa kaj surprizplena. Li skribis, ke somere, baldaŭ post fino de miaj ekzamenoj, li entreprenos longedaŭran vojaĝon al la sudo, ke samvoje li vizitos sian alipatran fraton kaj

tie restigos min gasti dum tri-kvar semajnoj ĝis sia reveno. Ne imagu, ke la onklo mem tiel allogis min ial al si, — tute ne! Li estis tre severa murmurulo kaj granda strangulo, tute ne tolerinta petolaĵojn, je kiuj mi, konforme al mia aĝo, estis eltrovema. Ĉiuj, senescepte, eĉ la patro fimis lin, kiel subitan noktan fulmotondron, kaj nomis lin «frenezulo». Komprenoble, gastado ĉe tia parenco prezentus nenion agrablan, se la onklo loĝus sola. Sed tie ĉi estas la esenco mem. La onklo estis seninfana vidvulo, en lia domo mastrumis du jam ne junaj virinoj — iaj parencoj de li, unu el kiuj havis filinon, mian samaĝulinon, Julia' n.

Antaŭ unu jaro la onklo pasigis kun ŝi preskaŭ la tutan someron en nia bieno kaj tiam mi ekvidis ŝin je unua fojo kaj tre baldaŭ amikiĝis kun ŝi en plena senco de la vorto. Ŝin oni ne povus nomi belulino, tamen ŝi estis tre ĉarma kaj delikata ekzistaĵo, bone edukita kaj neordinare talenta, De ŝiaj belaj versaĵoj estis ravataj ne sole mi, sed ankaŭ ĉiuj ŝiaj parencoj. La onklo adoris ŝin, nomis ŝin sia filino, treege zorgis pri ŝi kaj, kiel mi poste spertis, tre ĵaluzis ŝin al iu ajn. Estas superflue paroli, ke la somero pasis por mi en societo de tia amikino, kiel unu bela tago. La onklo havis multajn aferojn, li ofte kelkajn tagojn pasigis jen en la urbo, jen ĉe niaj najbaroj — nobeloj kaj neniu dum lia foresto malhelpis al ni, neniu ĝenis min. Mi ne scias, eble, ŝi preferus min al iu el knabinoj, sed en nia familio ili tute forestis kaj filinoj de niaj najbaraj nobeloj ne plaĉis al ŝi pro sia malhumileco kaj tromemfido. Krom tio ili interesiĝis sole je amuzaĵoj kaj ornamoj, kion ne ŝatis Julia, naskita kaj edukita idealistino. Jen, kio estis alloga kaj surprizplena en la letero, — revido de la ĉarma knabino, rememoroj pri kiu estis ankoraŭ tiel freŝaj en mia memoro.

Nature, mi uzis ĉiujn fortojn por venki mian maldiligentecon kaj malatentecon kaj triumfe finis la ekzamenojn. La patro, kiel ĉiam, senprokraste plenumis la promeson kaj mi ankoraŭ ne havis tempon por viziti en ĉirkaŭaĵoj de la bieno ĉiujn vidiindaĵojn, konatajn de la infaneco, kiam la vojaĝo al la sudo jam estis entreprenita de li.

La maro, sur kies bordo mem staris la somerloĝejo de la onklo, la belega montaro, neniam ankoraŭ vidita de mi luksa kreskaĵaro de la sudo ne impresis je mi tiel forte, kiel Julia. Meze de la sorĉa suda naturo ŝi, neniom simila al knabinoj, kiujn mi vidis en la urbo kaj en la kamparo, ŝajnis al mi ia nesurtera estaĵo. Ni renkontiĝis kiel malnovaj amikoj kaj dum la unuaj tagoj de mia estado ĉe la onklo, estis nedisiĝantaj dum tutaj tagoj. Sed la patro baldaŭ forveturis ien kaj la onklo, plu jam ne okupata de li, tuj rimarkis nian intiman amikecon kaj pro ia konsidero opiniis ĝin nedeca kaj nepermesebla. Sekrete de mi la knabino estis transloĝigita kune kun la patrino en najbaran somerloĝejon, kiu kuŝis je tri kilometroj proksimume de la somerloĝejo de la onklo en pentrinda monta regiono, kie loĝis ŝia avino. Tiel senkompate kaj kruele senigita je la sola homo, kiun mi tie konis kaj ŝatis, mi treege enuis. Ĉiuj belajaĵoj de la ĉirkaŭaĵoj, kiuj antaŭ nelonge ŝajnis al mi tiel majestaj kaj pentrindaj, tuj perdis por mi tutan

sian allogantecon, eĉ pli, — mi rigardis ilin malamike, kun abomeno, kvazaŭ ili estis kaŭzo de mia malĝojo. La onklo, malgraŭ siaj multaj strangaĵoj kaj ekscentreco, estis homo ĉiufanke instruita. En lia domo estis multaj libroj, interesaj sciencaj kolektoj, sed tio ĉi tedis al mi en la urbo kaj ne pri tio mi revis, venante al la sudo. Pasiginte en la izoleco tri tagojn, mi, fine, decidis profiti oftajn vizitojn de la onklo en Jalta' on kaj entrepreni viziton al Julia en ŝia nova loĝloko. Mi sciis nur ĝian nomon kaj proksimuman direkton, en kiu ĝi kuŝis, sed tio ne timigis min, mi estis tute certa pri tio, ke mi atingos ĝin kaj vidos tie mian amikinin. Mi ne eraris. La vojaĝo estis tre sukcese plenumita kaj mia kuraĝo inde taksita de la knabino kaj de ŝia patrino, kiu ankaŭ ŝatis min. Post tiu ĉi provo mi jam preterlasis nenium foreston de la onklo kaj ofte vizitis la intermontan somerloĝejon, rekompencante per tio min por longaj horoj de la kontraŭvola izoleco. Lastatempe mi eĉ trovis plej proksiman piedvojeton, kiu kunligis la ambaŭ somerloĝejojn kaj plu ne uzis por miaj montekskursoj la bruplenan ŝoseon.

Unufoje, jam en fino mem de mia gastado ĉe la onklo, li devis pasigi tri tagojn ekstere de la hejmo. Mi, kompreneble, bonuzus la okazon kaj ĉiutage farus miajn kutimajn ekskursojn en la montojn, sed ĝuste tiam okazis tiu ĉi historio kun la lanterno. La onklo forveturis frumatene per vagonaro kaj mi preskaŭ samtempe entreprenis la ekskurson kaj venis al miaj montaninoj ĝuste antaŭ matenmanĝo. La tagon mi kutime pasigis plej gaje en la ĉarma societo kaj, kiel ĉiam, revenis hejmen nur antaŭ tagmanĝo, kiu estis ordinare en la onkla domo en la kvara de vespero. Ĵus mi revenis, komenciĝis terura fulmotondro, kiu daŭris ĝis malfrua vespero. La maro furioze ondiĝis kaj bruis obtuze, neĉesanta tondro sonore eĥis en la montoj kaj pluvo fluis torente, kvazaŭ ĝi intencis je tiu ĉi fojo fortiri kun rapidegaj ŝaŭmantaj pluvriveretoj en la maron ankaŭ nian domon. Kaj tuj post la reveno, dum furiozis la fulmotondro, mi eksentis neordinaran, senkaŭzan premitecon kaj maltrankvilon, kiuj kreskis en mi kun ĉiu horo. Mi penis distriĝi je muziko, je libroj, sed nenio helpis, — la koro obtuze doloris en la brusto kaj ia neklara antaŭsento de danĝero, minacinta al mi, potence pelis min for de la domo. Sed kien iri? Krom la loĝantoj de la intermonta somerloĝejo mi konis nenium, kaj kion mi faros tie tiom neĝustatempe? Kion oni pensos pri mi? Sed ia nevidebla potenco, kiu tute ekregis min, permesis al mi jam nek longe rezoni, nek plu resti hejme.

La pluvego ĉesis, sed la ĉielo ankoraŭ estis malserena kaj sur la teron malleviĝis mallumo. Komenci ian ekskurson ĉe tiaj malfavoraj cirkonstancoj estus riskoplene kaj malsaĝe, mi nepre devis min provizi je ia lanterno, alie mi neeviteble povus droni en ia torento, aŭ perdi la vojon en la montoj. Mi kuris, kiel frenezulo, tra la ĉambroj, serĉante ian lanternon, sed ĉiuj serĉadoj estis senfruktaj: en la domo tute forestis lanternoj. Mi jam volis iri tra la ŝoseo, kie mi nek renkontus ian malhelpon, nek metus min en ian danĝeron, sed la potenco, ekreginta min, postulis, ke mi elektu por la ekskurso ĝuste la pli mallongan kaj pli riskoplenan piedvojon.

Jam vestinte pluvkitelon kaj ĉapelon kaj tute preta al la neĝustatempa promeno, mi tute senkonscie venis en la kabineton de la onklo. Kaj, ĵus mi malfermis ĝian pordon, mia rigardo falis sur la lanternon, starintan en vitroŝranko, kie en severa ordo estis metitaj tre valoraj fotografiloj de la onklo, kiu ŝatis iafoje sin okupi je fotografado. Mi sciis, ke mi neniam farus tian sakrilegion, ankaŭ mi sciis, ke la onklo neniam pardonus ĝin al mi, sed en tiu minuto, ne konsiderante sekvojn de tia bravulaĉa ago, mi eĉ sen plej malgranda hezito malsŝosis la ŝrankon kaj prenis la lanternon.

De la verando mi malsupreniris en la ĝardenon; kiel turnovento, mi trapaŝis ĝin diagonale, transsaltante florbedojn, barintajn mian vojon, kaj baldaŭ estis en vasta vinbergardeno. Nur tie ĉi mi haltis por unu momento kaj bruligis la lanternon. Ĵus larĝa strio de ruĝa lumo lumigis la apenaŭ rimarkeblan piedvojeton, mi ekkuris tra longa deklivo, sur kiu kuŝis la vinbergardeno kaj kiu limtuŝis mallarĝan ŝtonplenan valeton, en kies mezo fluis neprofunda rivereto. La mallumo plidensiĝis kaj la nekutima ruĝa lumo aldonis groteskajn, fantaziajn konturojn al bone konataj objektoj, kiuj estis je ambaŭ flankoj de la vojeto. Penante ordigi en la kapo pensojn, kiuj ĥaose interplektiĝis, kaj konjekti, kion povus signifi tiu ĉi mia nevenkebla maltrankvilo, kio povus okazi al la amata knabino kaj kion mi trovos tie, veninte, — mi kun plej malgrandaj detaloj rememoris ŝiajn vizaĝotraĵojn, hodiaŭan kostumon kaj nian interparolon dum promeno tra la montoj. Antaŭe bruegis la rivereto, kiu nun post la pluvego estis furioza torento, kaj post ĝi, sur alta fervoja surŝutaĵo, briletis tra la mallumo, kiel fajreretoj, fajroj de alproksimiĝanta vagonaro. Alte levinte en la mano la lanternon, mi senhezite eniĝis en la furiozan torenton, kiu, ŝajnis, uzis ĉiujn penojn por faligi kaj engluti min, — kaj malseka ĝis la zono mem mi leviĝis sur la kontraŭan bordon. Nur kelkaj paŝoj nun apartigis min de la surŝutaĵo, la bruado de la vagonaro jam superonis la torenton kaj mi, senkonscie, svingante per la lanterno, daŭrigis frenezan kuradon, kvazaŭ puŝata de ia nevidebla, nekontraŭstarebla forto.

Estis nepardonebla frenezaĵo transkuri la fervojon antaŭ la vagonaro mem, sed mi, kvazaŭ, celis fari ĝuste tion ĉi. Levinte la lanternon, kiel eble plej alte, antaŭ mi kaj lumigante per ĝi la krutan kaj glitigan pro la pluvego surŝutaĵon, mi faris frenezan penon per unu fojo suprensalti sur ĝin, sed la maŝinisto ĝustatempe rimarkis min, pli ĝuste mian lanternon, kaj akre-sona alarma fajfo neatendite skuigis min. Mi perdis ekvilibron kaj falis sur la deklivo, metinte, tamen, la lanternon apud la reloj mem.

La vagonaro tuj haltis, ekaŭdiĝis laŭtaj virvoĉoj, iaj nigrevestitaj figuroj kun lanternoj en la manoj amasiĝis apud la lokomotivo, iu penis levi min kaj persiste demandis ion. Neniel povante kompreni la okazintaĵon, mi, tuta tremante pro interna malvarmo, fine, levis la kapon de glua malseka sablo kaj la unua afero kion mi ekvidis, estis hela fajreraro de vagonaro, nerimarkeble aperanta elpost kruta vojkurbiĝo ĝuste renkonte al la haltinta. Penso pri la minacanta kunpuŝigo de la vagonaroj, kiel fulmo, traku-



ris mian cerbon kaj mi ekkriis el ĉiuj fortoj, montrante la alproksimiĝantan danĝeron kiun ankoraŭ neniu rimarkis.

Sur la lokomotivo kaj la surŝutaĵo komenciĝis neimagebla tumulto. Iu, preninte mian lanternon svingis per ĝi sur la surŝutaĵo, aŭdiĝis ies terurkriegoj, la lokomotivo, alarme fajfante, ekmoviĝis malantaŭen. Sed oni baldaŭ rimarkis la avertojn kaj la danĝero preterpasis.

Baldaŭ la ambaŭ lokomotivoj pace staris senmove nazo al nazo. Ĉiuj pasaĝeroj forlasis la vagonarojn, gratulis unu la alian kun la savo, kelkaj kortuŝe ploris.

Pro la fatala eraro oni ne atendis la unuan vagonaron, kiu ankoraŭ ne atingis la stacion, kaj sendis renkonte al ĝi la alian, tute forgesinte, ke la vojo estas jam okupita de la unua. La eraro estis rimarkita, nur kiam la dua estis malproksime. Antaŭvidante la neeviteblan katastrofon, oni tuj telegrafis en ĉiujn flankojn, petante helpon kaj pli frue, ol la timigitaj pasaĝeroj trankviliĝis, venis helpvagonaroj.

Nur tiam oni komencis serĉi la antaŭforiginton de la neevitebla katastrofo. Trovinte min sur la sama loko, oni kondukis min ien kaj enmanigis al mi mian lanternon. Baldaŭ ĉirkaŭis min rondo de sciivoluloj, kiuj volis vidi min. Oni dankis min, premis mian manon, sed mi malklare ankoraŭ konsciis la okazintaĵon kaj rolon, kiun mi ludis en ĝi. Min rekonsciigis nur la bone konata voĉo de la onklo, kiu staris antaŭ mi, larĝe malferminte la okulojn kaj fikse rigardante ĵen min, ĵen la lanternon.

— Sentaŭga knabaĉo!... — li balbutis. — Ĉu vi?... Kaj de kie vi aperis, de kie aperis la lanterno? Kiu permesis al vi preni mian lanternon...

Iaj urĝaj aferoj devigis la onklon ŝanĝi la antaŭan planon kaj reveni ĝuste kun tiu ĉi vagonaro. Kiam mi, konfuziĝante, ĉion rakontis al li, prisi-lentinte mian vizitadon de la monta somerloĝejo, li ne volis daŭrigi la vojon ĝis la stacio per la vagonaro, sed nepre postulis ke mi konduku lin hejmen tra tiu mallonga piedvoĵeto, tra kiu mi venis kaj kiun li tute ne konis.

— Kara onklo, tio ĉi estas neebla, vi malsekiĝos, vi dronos en la torrento... — mi komencis malkuraĝe kaj neniel povis trovi konvenajn vortojn por sciigi al li pri miaj sekretaj ekskursoj kaj ke la monta somerloĝejo kuŝas pli proksime, ol la hejmo.

— Ĉu ni tie ĉi pasigos la nokton? Vi, ŝajne, tute frenezigiĝis, — la onklo diris, sulkante la brovojn.

— Onklo, pardonu... sed tiel proksime de tie ĉi kuŝas la monta somerloĝejo... kaj mi volas, ke Ju... Julia tuj sciigu... pri via feliĉa reveno, — mi diris, kolektinte tutan mian kuraĝon kaj ruĝiĝante.

La onklo estis surprizita, tamen li konsentis.

De tiu ĉi tago mi povis vizitadi Julia' on, kiam mi volis kaj post kelkaj tagoj, la onklo ree transloĝigis ŝin en sian domon. Kaj la lanterno estis restigita al mi, kiel memorajo pri mia heroaĵo, savinta vivon, eble, de kelkaj centoj da homoj.

La rakontanto subite silentiĝis kaj enpensiĝis.

- Kaj Julia?... — mi demandis lin. — Ĉu ŝi poste fariĝis via edzino?  
 Responde, li nee ekbalancis per la kapo, premis malfacilan ekspiron, kontraŭ lia voĉo elflugintan el la brusto, kaj per pli mallarĝa voĉo aldonis:  
 — Nel! Ŝi mortis pli frue...  
 — Kaj kian rekompencon vi ricevis poste por via heroaĵo? — mi ree demandis lin, por dispeli malgajecon, kiu kovris lian belan vizaĝon.  
 — Rekompencon?... — li ripetis la demandon kaj fiksas je mi siajn larĝe malfermitajn okulojn, kvazaŭ mia demando entenis en si ion tre strangan, neordinaran. — Kion vi parolas? Ĉu vi forgesis, en kia land... Se tio ĉi okazus ie en Francujo, Anglujo... sed niaj samlandanoj ne ŝatas tiajn sentimentalajojn... Ĉu vi kredas, oni volis puni min, ke mi, estante privata persono, uzis dum mia ekskurso en ĉirkaŭaĵoj de la fervojo la ruĝan lanternon, kiu estas fervoja dangersignalo. Nur klopodoj de la onklo kaj kelkaj gravaj personoj, savitaj de mi, liberigis min de malagrablaĵoj, kiuj minacis al mi.  
 Li etendis al mi la manon kaj eliris el la ĉambro.

IVAN ŜIRJAEV

Premiita en la XII-aj Internaciaj Floraj Ludoj.

## Principoj de Esperanto

(fino)

§ 16. En kelkaj fakoj (marveturo, industrio, militado) kaj en kampara vivo, kie distancoj aŭ bruoj malhelpas la interparolon, ankaŭ en telefonio, kie la voĉo iom malklarigas, fine inter diversnacionoj kiuj ne perfekte parolas, estas grava por lingvo ĝia sona klareco kaj facila distingeblo de formoj. El tiu vidpunkto oni jam rimarkis troan similecon inter la korelativaj vortoj: *kia, kiam, kian, kien, kie, kiel, kies, kio, kiom, kiun, kiuj, kiu, tiu, ...* ktp. La praktiko de nia lingvo do elpensis pli distingeblajn formojn: *kiamaniere, kiomgrade, tiutempe, pro kio, ...*

Oni proponis ankaŭ la internaciajn: *eosto-ŭesto*, anstataŭ praktike neoportunaj: *oriento-okcidento*. Eble estus pli trafe alpreni ankoraŭ pli distingeblajn: *eoso-veso, kies etimologio jenas: helena eos matenlumo, aŭroro, angla east, franca est, germana ost, oriento; latina vesper, angla west, germana west, franca ouest* okcidento.

Ankaŭ: *ses-sep* ne sufiĉe diferencas, kaj oni proponis *sis*, prenita el la franca.

§ 17. Unu el malklaraj punktoj de la sintakso estas la artikolo. Fakte, krom la difina artikolo (la) estas larĝe uzata ankaŭ la nedifina (unu aŭ iu).

En la Fundamento ni legas (Ekzercaro § 11): «Unu vidvino havis du filinojn. La pli maljuna...» (§ 15): «En unu tago, kiam ŝi estis apud tiu fonto...» La Fundamenta Krestomatio siavice prezentas multajn similajn ekzemplojn. Nuntempe, por rolo de nedifina artikolo oni prefere uzas *iu*, ekz. en la «Literatura Mondo».

La Fundamento ne donas regulojn pri uzado kaj ne uzado de la difina artikolo. Ĝi nur diras, ke «la uzado de l' artikolo estas la sama kiel en la franca kaj en la germana. Kaj la personoj, kiuj trovas ĝian uzadon malfacila, povos tute bone ĝin ne uzi». Tiu klarigo pri la artikolo ŝajne pruvas ke Zamenhof mem malmulte ĝin ŝatis, allasinte ĝin en Esperanton nur por ne ŝoki la nacian kutimon de angloj, francoj, germanoj. La latina, slava, kma. ne havas la artikolon. La uzado de l' artikolo en la franca kaj en la germana lingvoj kune ne estas ĉiam klara kaj firma.

Aliflanke, la uzado de l' artikolo ĉe bonaj esperantistaj aŭtoroj ne estas unuforma kaj reguleca. Ekzistas eĉ verkoj tute sen la artikolo. Aŭtoroj, kiuj ne havas klaran komprenon pri la artikolo, ĝin uzas trafe kaj maltrafe, prefere ili ĝin trouzas, ĉar ili opinias ĝin elegantajo.

Ke la uzado de l' artikolo en Esperanto ne estas la sama kiel en la germana, tio estas facile pruvebla. Unue, la franca kaj germana artikoloj montras sekson (le, la, der, die, das). Due ĝi montras nombron (les, des, die). Trie ĝi montras kazon (du, au, des, aux, den, dem,...). Kvare ĝi servas por formi substantivojn el verboj (être-un être, coucher-le coucher, leben-das Leben, haken-der Haken). Kvin ĝi uziĝas ĉe geografiaj nomoj (La Corse, Le Chili, Les Antilles, der Rhein, die Rhone, das Categat). Ĉiuj kvin manieroj uzi la artikolon ne ekzistas en Esperanto.

La difina artikolo en Esperanto povas havi nur utilan rolon: mallongigi la esprimojn. Frazo: *Voku doktoron* povas signifi: voku iun ajn doktoron. Frazo: *Voku la doktoron* povas signifi: voku doktoron, kiun ni konas. *Mi portas ĉapelon* povas signifi: mi portas iun ajn ĉapelon. *Mi portas la ĉapelon*: mi portas mian ĉapelon. *En la 1925*: en jaro numerita per 1925. *Mia lando estas malriĉa, la via abundas*: mia lando estas malriĉa, via lando abundas. Kiel la nomo «difinita» artikolo, tiel la opinio ke ĝi «difinas» estas bazitaj sur la miskompreno, sur la apliko de la naciaĵoj al la internacia lingvo.

§ 18. Kelkaj personoj, fremdaj al nia movado, malaprobis kaj primokis nian poezion, eĉ tutan nian belliteraturon, tradukan kaj originalan. Kontraŭ nia originala poezio ili afirmis ke nur en sia propra lingvo oni povas esti poeto. Kontraŭ nia traduka literaturo ili atentigis pri tio ke niaj tradukaĵoj, nekapablaj esprimi la originalojn, estas krom tio malsuperaj je la alinaciaj tradukaĵoj de l' samaj originaloj. La unua kontraŭdiro estas justa nur por la naciaj lingvoj, kiujn plene posedas nur tiuj kiuj ilin uzis depost la infanaĝo. Esperanton oni povas eĉ pli posedi ol sian propran lingvon. La dua kontraŭdiro estas egale justa por Esperanto kaj por la naciaj lingvoj. Kaj se oni tradukaĉas en la naciajn lingvojn, oni same povas tradukaĉi en Esperanton. Kelkafoje la Esperanta traduko, farita de la naciانو mem, po-

vas esti pli ĝusta ol la alinacia, farita de la alinaciano. Se pluraj malbonaj tradukoj en Esperanto povas esti pardonitaj, pro la juneco kaj malriĉeco de nia movado, la multegaj malbonaj naciaj tradukoj ne povas esti pravigitaj. Esperanto, kiu vegetas dum 40 jaroj inter la kelkmilaj da ideemuloj, ne povas esti traktata same kiel lingvo de iu potenca nacio, ekzistanta dum mil jaroj, uzata de milionoj da homoj.

La poezio en Esperanto povas ekzisti kaj ekzistas, ĉar estas la homoj kiuj pensas, sentas, kaj ĝojas en Esperanto, kiel en loko pli kvieta kaj pli justa ol iliaj patrolandoj.

§ 19. Konservado de nia lingvo estas eble plej grava kaj plej malfacila tasko, kiu staras antaŭ tiuj, kiuj volas gvidi — idee aŭ materie — nian movadon. Se la lingvo estus simila al iu mekanismaĵo, la konservada tasko konsistus nur en zorgo pri la tuteco de ĝiaj partoj kaj pri la regula funkcio. Tiel efektive konsideras Esperanton reprezentantoj de la simplista konservemo.

Sed en realo nia lingvo travivas ankoraŭ periodon de kreskado kaj formiĝado, kiu koincidas kun periodo de disvastigado en la tutmondo. Tial la «konservado» de Esperanto havas tute alian sencon, almenaŭ por reprezentantoj de la evolua progresento. Por la lastaj gravas la konservado de unueco de nia lingvo, kiu senĉese aliĝas kaj maturiĝas. La unueco de Esperanto estas komuna celo de ĉiuj esperantistoj. Sed, dum la konservemuloj volas daŭrigi la unuecon per la netuŝebla senmoveco, male la progresemuloj opinias ke la unueco estos garantiata per la unuanima samtempa akceptado de la ŝanĝoj en la lingvo.

Zamenhof estis unua kiu faris la ŝanĝojn en Esperanto. Post kaj apud Zamenhof, centoj da pioniroj ilin akceptis, kaj faris aliajn ŝanĝojn. La tuta Esperantistaro nur uzas lingvon iom alian ol estis la primitiva Esperanto. Do, nia lingvo efektive ŝanĝas, kaj neniam forto en la mondo povas haltigi ĝian evoluadon. La konservemuloj iluzias, kiam ili kredas gardi netuŝebla nian lingvon. La libroj vere restas netuŝeblaj, ne la lingvo.

Se nia lingvo konstante aliĝas, do restas nur duaspeca konservado de la unueco, por kiu devas koncentriĝi ĉiuj fortoj de lingve spertaj pioniroj. Estas bedaŭrinde ke pluraj influaj esperantistoj, anstataŭ kontribui al la interna ordo, foruzas siajn fortojn por haltigi la evoluon de nia lingvo al la plimatura ŝtupo. Historio de Volapuka movado estas instruoplena por ni, kaj estus utile ĝin eldoni en aparta broŝuro. Multe pli da estimo akirus prelato Ŝtejer kaj malpli da fortoperdo li kaŭzus, se — anstataŭ obstina konservemo — li tuj aliĝus al Esperanto, kiel al pli taŭga formo de tutmonda lingvo. Tial, neniu prudenta homo diras ke Esperanto estas lasta formo de la mondlingvo.

§ 20. Nia lingvo, se ĝi volas vivi, devas kreski. Sed ni ne devas ĝin subite kreskigi, per vojo de revolucio, radikala reformo, ni povas nur iompost-iom partopreni en ĝia evolucio, senrompa plibonigado, pliriĉiĝo.

Evoluo de naciaj lingvoj iras laŭhazarde, neregule, senhorde. Evoluo



de nia artefarita lingvo povas flui regule, se ni volas tion, ĝi fluas malregule, se ni malzorgas pri nia lingvo. Por prizorgi, eduki nian junan lingvon, necesas sistema agado de unu lingva centro, kiu havos sperton kaj forton por plenumi sian rolon. Tiu centro kolektos internacian materialon, preparos listojn kaj skemojn pri la reguleco, laboros super modela internacia fundamento. Ĝi ne havos centojn da honoraj anoj, sed tri-kvar fakulojn, sub kies gvidado utile laboros centoj da bonvoluloj, loĝantaj en la tuta mondo.

Por uzi ekzemplon, ni povas rememori ke la forto de UEA kreigis dank' al saĝa gvidado de tri-kvar samideanoj, kiuj fervore laboris por atingi la realan celon. Se UEA estus gvidata per dekoj aŭ centoj da personoj ĝi nun eĉ ne ekzistus.

La nuna LK povas bone daŭri en sia rolo de konservema organo, sen iniciativo, kun kontrola aŭtoritato. La estonta «lingva centro» plenumos alian taskon: elekti taŭgajn formojn, iniciati ilian provan uzadon, zorgi pri la unuanimeco en la evoluo. Kun tiaj du institucioj, kies taskoj interekvilibras, nia lingvo evitos danĝeron de l' ekstremajoj: tro inertan senmovecon kaj tro rapidan progreson. Tia organizo ekzistas en ĉiuj vivipovaj regnoj, en kiuj forto de l' maljunuloj kaj forto de l' junuloj harmonie kuniĝas por la bono de l' regnolando.

\* \* \*

Esperanta literaturo estas sintezo kaj plejalta esprimo de ĉiuj kvalitoj kaj tendencoj de nia lingvo, kiu naskiĝis en formo de l' libreto kaj kies estonta povo dependos de la libraro. Oni povus eĉ diri ke la tutmonda akcepto de Esperanto malfruiĝas pro manko de la kompletaj vortaroj, teknikaj verkoj kaj fakaj terminaroj.

Milionoj da islamanoj studas tre malfacilan araban lingvon por legi per ĝi nur unu libron, la Koranon. Ofte okazas, ke iu studento aŭ profesoro studas tiun aŭ alian fremdan lingvon por legi nur tri-kvar fakajn librojn, kies tradukoj ne ekzistas. Multaj filozofoj lernis la helenan nur pro verkoj de Plato kaj Aristotelo. El tiuj ekzemploj, kies nombro povas laŭvole esti grandega, oni povus tiri konkludon, ke la bona verko estas potenca disvastigilo de sia lingvo.

Se iu geniulo akceptus nian lingvon por skribi en ĝi siajn ĉefverkojn, tio estus por nia lingvo preskaŭ venko. Aŭ se ni povus eldoni Esperante dekon da kompendiaj verkoj por unu fako, ekz. por matematiko, fiziko, biologio, kemio, tiam nia lingvo estus studata de miloj da personoj en la tuta mondo, kiuj poste grave helpus nian movadon. Presigi logaritmaron, geografian atlason, plurlingvan leksikonon — kun klariga Esperanta teksto — estas pli utila ol akceptigi cent mil propagandajn artikoletojn en la ĵurnalaro. Ĉar per la unua ni donas faktajn utilojn, kies valoro daŭras jarcente, dum per la dua ni eldiras vortojn, kiujn forgesigas sekvanta tago.

La Esperantistaro ĉiujare elspezas por Esperanto pli ol unu miliono da oraj frankoj. Kvarono da tiu sumo, elspezota ĉiujare, sufiĉos por konstante eldonadi fakajn ĉefverkojn. — P. STOJAN. L. K.

## Pro... kaj Por...

*Preseraro* — En la raporto de Sro. Josep Ventura, aperinta en nia lasta numero, enŝoviĝis preseraro. — Sur paĝo 363, Originalaj Tekstoj, 1, linio 8, oni legu: Ĝi estas granda laboro de la verkinto, kiu sciis disvolvi legendan argumenton en facila formo, kiu ne forprenas al ĝi ĉarmon.

*Esperanto-tago en Rubi*. — Kun eksterordinara sukceso okazis la 29 de junio la festo de propagando, kiun la loka Esperanta Burgono organizis kune kun Aplec el Sabadell kaj Lumon el Terrassa.

Granda nombro da samideanoj renkontiĝis en Rubi por partopreni la diversajn festojn, kiuj kun bona ordo kaj ĉarma allogo rapide fluigis la homojn. Multaj samideanoj partoprenis la atletajn konkursojn, kiuj okazis dum la mateno, antaŭ la vizitoj al Escolès Ribas kaj Celler Cooperatiu.

Tagmeze havis lokon festeno en Hotel Catalunya. Post la manĝo, kiu kunigis multajn gesamideanojn, paroladis kelkaj pioniroj kaj ankaŭ Sro. Teo Jung, kiu laŭdis la ĉarmon de niaj festoj, la belecon de nia lando kaj la gastamon, kiun li ĝuis ĉiuloke.

Posttagmeze kun la alveno de pli multaj esperantistoj, la propaganda festo okazinta en la bela «Centre Democràtic Republicà» atingis nepris-kribeblan sukceson. La tuta teatro estis plena de scivolemuloj, kiuj atente aŭskultis la trafajn argumentojn de Sroj. Dalmau kaj Solà. Niaj poetoj Jaume Grau kaj Artur Domènech deklamis kelkajn poeziojn. Sro. Jung alparolis la publikon kun la celo prui la facilecon de Esperanto inter homoj el diversaj lingvoj kaj Sro. Solà tradukis la necese mallongan sed efikan paroladon. Fine Fino. Palmira Castellví regalas la ĉeestantojn per sia bela voĉo. Komuna kanto de nia himno fermis la feston.

Ni esperas, ke la restariĝo de Esperanta Burgono alportos al nia enlanda movado plian forton. Ni estas certaj pri tio ĉar la fervoro de niaj amikoj Pernas kaj Ratés ne elĉerpiĝos.

*Vespermanĝo de ĝentileco*. — En Restoracio Pàtria, Barcelona, okazis la 2 de julio, intima vespermanĝo por honori nian nunjaran laŭreaton, Sron. Teo Jung.

Dum la vespermanĝo, kiun partoprenis ĉirkaŭ 25 samideanoj, okazis viglaj diskutoj pri diversaj temoj kaj tio efike impresis du ĵurnalistojn, kiuj akceptis la inviton partopreni la festeton.

La prezidanto de K. E. F. klarigis la kialon de la festo kaj mallonge priskribis la signifon de niaj Floraj Ludoj kaj proponis honoran lokon al Sro. Jung, kiu kun emocio eldiris siajn impresojn kaj travivaĵojn ĝuitajn dum la kelksemaĵna restado en Hispanujo kaj precipe en nia teritorio.

Inter la ĉeestantoj ni vidis Drojn. Bremon kaj Bartomeu, Sroj. Grau, Domènech, Santamarina, Masriera kaj multajn aliajn.

La gazetoj «Las Noticias», «El Diluvio» kaj «Deutsche Warte» publikigis raporton pri la festo.

Ni dankas Sron. Jung, kiu revenis jam al sia patrujo, ke li honoris nin kaj niajn Florajn Ludojn per sia ĉeesto, kiun ni longe gardos en la koro.

*Novaj grupoj.* — En Santa Coloma de Gramanet fondiĝis nova grupo Internacia Frateco. Oni komencis kurson sub la gvido de s-no Arnella kaj kun la helpo de s-no S. Alberich. La nova grupo, al kiu varme ni deziras multajn sukcesojn, decidis aliĝi al K. E. F.

Esperantista Amikeco estas la nomo de la grupo stariĝinta en Barcelona (St. Andreu), ĉe la sidejo de Casal Catòlic. La organizintoj de la nova kunbatalanto estas certaj ke post kelka tempo ilia grupo enkalkulos multajn membrojn dank' al la favora situacio, kiun ili ĝuas en Casal Catòlic, socioeto kun kelkaj centoj da membroj. Granda ekspozicio estas organizata kaj komenco de kurso anoncita.

*Radio Barcelona.* — Regule okazas ĉiun trian merkredon, je la 22-a. hispana somera horo, parolado en Esperanto. Ĝis nun paroladis Sroj. S. Alberich, Domènec kaj Dalmau. La 15 de septembro parolados S-ro. Jaume Grau pri «La Kongreso en Edinburgo» kaj la 20 de oktobro pastro Josep Casanovas pri «Esperanto ĉe la katolikaro».

Ni petas niajn kolegojn, ke oni anoncu la paroladojn, kaj la aŭdintojn, ke ili sendu gratulan p. k. al Radio Barcelona, str. Casp, 12, Barcelona.

*Geedziĝo.* — Nia kara samideanino, Fino. Palmira Castellví, edziniĝis la 5 de julio kun Sro. Haver Haider el Landshut (Germ.). Tiu ĉi feliĉa paro forlasis nian landon por ĝui la miellunon kaj definitive resti en Landshut.

Al la novaj geedzoj ni esprimas nian plej profundan simpation kaj la deziron, ke ili longe ĝuu la geedzan hejmon, dum nostalgie ni rememoros tie ĉi la dolĉajn kantojn de nia forfluginta najtingalo.

*Esperantista Klubo Palma.* — Kun granda sukceso okazis la 18 de julio la XX datreveno de la fondiĝo de Esp. Klubo Palma (Palma de Mallorca).

La festenon, kiu okazis en Hotelo Ca's Català, partoprenis granda nombro da samideanoj. Regis granda entuziasmo, kiu atingis sian supron ĉe la parolado de diversaj fervoraj samideanoj.

Pasttagmeze, en la sidejo de la Klubo, okazis literatura kunveno kaj malfermo de ekspozicio. Sro. Bofill alparolis la publikon kaj lia flua parolo elpruvis la utilecon de Esperanto, ĝian kontentigan disvolvigadon kaj pacan celon. Li ankaŭ raportis pri la kongreso de K. E. F. kies ordon kaj seriozecon li admiris, sed pri la kongreso de Hispana Esperanta-Asocio li ne povis diri la samon. — Sro. Rosselló kaj pastro Font ankaŭ paroladis.

Oni disdonis premiojn al la kursanoj, kiuj pruvis pli grandan lertecon kaj studemon dum la kurso 1925-26.

Finigis la festo per komuna kanto de La Espero,

*Kongreslibro de K. E. F.* — La O. K. de nia kongreso en Sta. Coloma de Farnés sendis al ni kelkajn ekzemplerojn de la Kongreslibro. Ni sendos ĝin senpage al ĉiuj petantoj, membroj de K. E. F.

*Vizitoj.* — Nia kataluna samideano Masriera el Madrid pasigis kelkajn tagojn kun ni. En la sidejo de Esp. Soc. Paco kaj Amo li faris tre interesan prelegon pri «Novaj idealoj de la vivo» per kiu li pruvis sian superan kulturon kaj altan konon de ĉiuj filozofiaj demandoj.



## Bibliografio

(Ni recenzas verkojn duope ricevitajn)

VERDKATA TESTAMENTO. — Originalaj poemoj de Raymond Schwartz. Deponejo: Centra Librejo Esperantista, 51 rue de Clichy, Paris. — 1926. 121 paĝoj, 16 $\frac{1}{2}$  × 13. Prezo: 10 fr. fr. aŭfrank.

La aŭtoro de Verdkata Testamento sukcesis ne nur la vivantojn sed ankaŭ la mortintojn amuzi per sia sprita verko. Antaŭ 13 jaroj mi konatiĝis kun Sro. Schwartz kaj malgraŭ tio ke mi ne scipovis Esperanton, li fidel-sprite rakontadis siajn travivaĵojn al rondo de esperantistoj, ke mi bone komprenis liajn ŝercojn kaj ne imiteblajn vortludojn.

La poemoj estas bele rimitaj kaj ritmitaj. La vortoj estas facile uzataj de la aŭtoro, kiu montras specialan kapablon por ludi plej diverse kun ili. La senco de multaj versoj certe ne plaĉos al ĉiu leganto, kaj plej kredeble la legantinoj rigardos la paĝojn kaŝe por ne ruĝiĝi dum legado antaŭ la gepatroj, fianĉo aŭ edzo.

Mi antaŭvidas grandan sukceson al la verko de Sro. Schwartz, kiu liveris al ni ion tute novan, plene bonhumoran, lingve tre akceptindan.

Aĉetu, amikoj, V. T. kaj vi sendube bedaŭros, ke vi ne aĉetis ĝin antaŭe.

BENJAMENO F. SMITH. — Historieto pri elfarado de Everet W. Lord. Boston, 1926. 17 paĝoj, 18 × 13.

Dank' al la malavareco de Sro. Smith oni povis eldoni la libreton, kiun oni donacis al la lernantoj en Kolegio de Komerca Administrado de Bostona Universitato.

La teksto priskribas la bonŝancon vivon de Sro. Smith, kies negocaj entreprenoj kontentige sukcesis kaj per tio oni intencas inspiri la leganton por similaj rezultatoj.



Ŝajnas al mi, ke la eldono ne multe sukcesos kiel fonto de inspiroj, tamen la bonhavigo priskribita multe povas helpi nian movadon kaj tio estas aparte interesa por nia afero.

La lingvaĵo uzata de la verkinto povus esti pli bona ol ĝi estas. Legante la malmultajn paĝojn de la libreto, oni ricevas la impreson ke la tekston skribis nespertulo kaj ke post supraĵa korektado oni presigis ĝin.

La eldono estas luksa sed kun amaso da sintaksaj malperfektaĵoj.

MATEO FALCONE KAJ ALIAJ RAKONTOJ de Prosper Merimée. — Biblioteko Tutmonda n.º 1. El la franca tradukis J. Borel. Eldonis Rudolf Mosse, Esperanto Fako, Jerusalemer strasse 46-49, Berlin S. W. 19. — 1926, 62 pĝ.  $17 \times 10 \frac{1}{2}$ . Prezo aŭfrank. de la unua serio (10 numeroj): 4 R. M. aŭ 1 dolaro.

La unua volumo de la nova «Biblioteko Tutmonda», pri kiu ni parolis en niaj numeroj de aprilo kaj majo, superas la esperon, kiun havis la esperantistoj ĉe la anonco de la granda entrepreno de Rudolf Mosse. La tre malalta prezo anoncita por la tuta serio nepre devas altiri multajn abonantojn. Dek numeroj 64-paĝaj, bela bindo, bona preso, valoras ja pli multe ol 4 R. M.

Sro. Borel sukcesis traduki tre talente la belan priskriban stilon de Merimée. Kun facila stilo li respegulas la ĉarmon de la originalo. Sen eraroj, preskaŭ fundamente perfekta, la unua volumo estas garantio de la boneco de la sekvontaj. Preseraroj estas, sed tre malmultaj: pĝ. 16, 4-a. linio malsupre, *sia* estas uzata anstataŭ *lia*: pĝ. 55, *spite* de anstataŭ *spite*.

El la kvar rakontoj reliefigas Mateo Falcone. Ĝi estas belega priskribo de la karaktero de Korsikano.

Tre sincere ni rekomendas al niaj legantoj, ke ili mendu la unuan serion. Ni estas certaj, ke ili mendos la sekvontajn.

ESPERANTUJA KANTO. — Teksto de J. Roskes, muziko de Hugo Nolthenius. Havebla ĉe Sino. Cath. J. Roskes — Dirksen, Anemoonstr. 96, Hago. Prezo: 0. 20 florenoj.

Tre inspirita melodio kun harmonio tre vigla. La konstruo de la frazoj estas lerte disvolvita kaj ĝi ĝuste akordiĝas kun la entuziasmo de la muziko.

OFICIALA JARLIBRO de la Esperanto-Movado. — 1926. Universala Esperanto-Asocio, 12 Boulevard du Théâtre, Genève. 360 pĝ.  $16 \times 12$ .

Libro tre interesa kaj utila ne nur por praktikuloj sed ankaŭ por propagandistoj, kiuj povas ĉerpi el ĝi tre interesajn informojn kaj statistikojn. Ĝi enhavas krom abundaj informoj pri esperantismo la kutiman adresaron de delegitoj, vicdelegitoj, grupoj, k. t. p.

Rimarkinde ke oficiala libro ne atentis oficialajn konsilojn pri lingvaj aferoj.

UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO. — Kongresa Libro, Edinburgo 1926. 87 pĝ.  $21 \times 12 \frac{1}{2}$ .

Informoj pri la XVIII Kongreso kaj II Internacia Somera Universitato, informoj pri la Oficialaj Institutioj, Kontrakto de Helsinki, Gvidilo al Edinburgo, plano de la kongresurbo, k. t. p.

Luksa eldono tre interesa por la kongresanoj.

B. E. S — ADRESARO. — Eldono de Bohema Esperanto-Servo, Moravany, Ĉeĥoslovakujo, 1926, 68 pĝ. 15 × 12. Prezo: 1. 50 sv. fr.

Adresaro de esperantistoj kaj neesperantistoj dezirantaj korespondi aŭ interŝanĝi.

JARLIBRO de la Lingva Komitato kaj de ĝia Akademio. — Esperantista Centra Librejo, 51 rue de Clichy, Paris. 1926, 32 pĝ. 16 × 11 1/2. Prezo: 2 fr. fr.

Ĝi enhavas la Regularon de la L. K., informon pri verkoj rekompencotaj de la Akademio, liston de la L. K. — anoj kaj Akademianoj kaj la Zamenhofan sistemon pri landnomoj. — SALJO.



## Lingva Komitato

Elektoj 1926. — Voĉdonintoj: 103 Plimulto: 52. Estas elektitaj por 9 jaroj: Sroj. Bennemann. 94 voĉoj, Stroele (reelekto) 92, Scott 91, La Colla 84, Ĉernohvostov 83, Waringhien 83, Grau Casas (Jaume) 81, Ellersiek 79, Pillath (Zanoni) 79, Sino Dresden 78, Sro. Kreuz 77, Döhler 74, kaj Karolczyk (Eska) 74, Por 8 jaroj: Sroj. Grot 71, Grenkamp — Kornfeld 66, Rosselló Ordines 64, Kostecki 60.

\* \* \*

Al tiu ĉi *Unua demando*: «Ĉu vi permesas, ke, por laŭeble egaligi la nombron de la ĉiujare elirantaj membroj, la Estraro Konsideru elektitaj por 8 jaroj anstataŭ 9, tiujn, kiuj ricevos malpli da voĉoj».

Respondis: 92, jes; 6, ne. 5 ne respondis.

Sekve la 13 unuaj estas elektitaj por 9 jaroj kaj eliros en la jaro 1935; la 4 lastaj, por 8 jaroj kaj eliros en la jaro 1934 kune kun la 8 anoj elektitaj en 1925. — Tiel 12 komitatanoj eliros en 1934 kaj 13 en 1935.

Al *Dua demando*: «Tre — eble tro — multnombraj estas nun la L. K. — anoj. Tia multnombro malplifaciligas la konstantajn interrilatojn kaj peze pligravigas la elspezojn. Kvankam laŭ la § 2 de nia Regularo la nombro de la L. K. — anoj ne estas limigita, ĉu vi ne opinias, ke saĝe estus oficiale esprimi al la Estraro la deziron, ke ĝi proponu *novajn* Kandidatojn nur por la postenoj, kiuj fariĝis vakantaj dum la pasinta jaro?»

Respondis: 95, jes; 3, ne. 5 ne respondis.

Ne estas necese certigi, ke la Akademio kaj ĝia Estraro plej atente zorgos pri la plenumo de tiu ĉi deziresprimo de la Komitatanoj. — La Prezidanto de la Akademio: TH. CART.

---

Tiu ĉi numero de «Kataluna Esperantisto» estas submetita al la militista cenzuro.

Prezo de unu klingo  
0'30 ptoj.  
Rabaton al la  
Esp. Grupoj.



Oni serĉas seriozajn  
reprezentantojn  
kaj agentojn.

« ESPERO » estas la plej praktika kaj ekonomia razklingo.

Petu ĝin de «Komercesta Kompanio Kataluna»

str. Marquès del Duero, 101. - BARCELONA

---

## KATALUNA ANTOLOGIO

KOMPILITA DE  
JAUME GRAU CASAS

416 paĝoj 22 × 16

Aĉetebla ĉe la Barcelonaj Grupoj kaj ĉe «Kataluna Esperantisto».  
València, 245, je 12 ptoj.

Por la resto de la Iberia duoninsulo kaj eksterlando oni sin turnu  
al S-ro. Eduard Capdevila, Carders, 29, Barcelona.

Prezoj kun rekomendita poŝto enkalkulita: Por Iberio: 13 ptoj. Por  
eksterlando: 15 ptoj. 9 ŝilingoj, 11 svissaj frankoj aŭ 2 dolaroj.

Laŭ la juĝo de kompetentaj esperantistoj, la Kataluna Antologio  
estas unu el la plej valoraj verkoj en Esperanto.

Aĉetu baldaŭ la libron kaj diskonigu tra la tuta mondo la altan  
gradon de kulturo de la miljara kataluna lingvo.

---

### Avís importantísim

Novament hem de pregar als nostres abonats que encara no han  
pagat l'abonament de 1926, que sense més ajornament ens trametin  
el deute que tenen amb KATALUNA ESPERANTISTO si no volen com-  
prometre seriosament la situació econòmica de la Federació. És un  
deure que cap bon samideano pot oblidar.

# L'ESPERANTO A COP D'ULL

ALFABET. — A, b, c (ts), ĉe (tx), d, e (é), f, g (gue, gui), ĝ (tj), h (aspirada), ĥ (fortament aspirada), i, j (y), ĵ (j), k, l, m, n, o (ó), p, r, s (ss), ŝ (ix), t, u, ŭ, v, z (s).

*L'accent tònic recau sempre sobre la penúltima sil·laba (paraules planes)*

## LA

article determinatiu

el, els  
la, les

## J

(sona y)

i es terminació del plural

faktoj, manoj  
okuloj, animoj

## IN

sufix per al

femení

heroino, reĝino  
katino, leonino

## O

terminació  
substantiu

lakto  
urbo  
**komerco**  
(comerç)

## A

terminació  
adjectiu

blanka  
antikva  
**komerca**  
(comercial)

## I

terminació verb  
(infinitiu)

kompreni  
labori  
**komerci**  
(comerciar)

## E

terminació  
adverbial

klare  
konstante  
**komerce**  
(comercialment)

## CONJUGACIÓ DEL VERB

### AS

temps present

### IS

temps passat

### OS

temps futur

### US

mode condi-  
cional

### U

mode impera-  
tiu o subjunc-  
tiu

Mi	skribas	skribis	skribos	skribus	skribu
Jo	escric	escrivi	escriuré	escriuria	escrigui

Els verbs compostos es conjuguen amb el verb auxiliar *esti*, i les formes de participi *ant*, *int*, *ont* (actiu: present, passat i futur) i *at*, *it*, *ot* (passiu: present, passat i futur). *Mi estas skribanta*, jo estic escrivint. *La letero estis skribata*, la lletra fou escrita

## DECLINACIÓ DEL SUBSTANTIU

En esperanto, tota paraula que rep l'acció d'un verb (complement directe) acaba en **N**.

*Li vidas min.* Ell em veu.

*Mi vidas lin.* Jo el veig.

*Mi skribas la leteron.* Jo escric la carta.

En els altres casos, la relació que hi ha entre dos substantius és expressada per mitjà de les preposicions *al*, *de*, *kun*, *per*, *sur*, *super*, *sub*, *en*, *ekster*, *tra*, *trans*, *antaŭ*, *post*, *inter* i altres.

*Al la patro, per la plumo, sur la tablo.*